

V-19479/34

(1965)

Bulgaria

Esperanto

ESPERANTISTO

V-19479

dot.



1965

1

E N H A V O

Paĝo

Ĉefartikolo. 1965 — Jaro de la Bulgara Esperanto-Junularo (D. Ĵdrakov)	1
* * * Literatura konkurso	3
* * * La Ministerio de la Popola Klerigo kaj Esperanto	4
Petr Taŝkov. Rememoroj pri la Granda Oktobra Socialisma Revolucio	5
Penju Penev. Kiam oni konstruis la fundamentojn	7
Ĥr. Gorov — Ĥrima. Ĝis revido	8
Ŝinka Filaretova. Amikeco	8
K. Gusev. Ĉu vi scias, amiko?	8
Tibor Sekelj. Esperanto en la fakojn	9
Magister Isaj Dratver. Nia ora jubileo	10

JUNA ESPERANTISTO

* * * Dua Internacia Seminario kaj Ferio-Semajno ĉe Primorsko . .	11
* * * Alvoko pri konkurado al ĉiuj junularaj grupoj	14
* * * Junularaj novaĵoj	15
* * * Grava sciigo pri la junpioniraj grupoj	16

Kovrila paĝo: La plej malgranda skiisto en restadejo „Vasil Kolarov“ — Rodopi-montaro, kie okazis naciaj skikonkuradoj.

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespondanoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.	NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova.	RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.
KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.	SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Miĥnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B-162.
	SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

1965 — JARO DE LA BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

„La juneco estas suno kaj beleco de la vivo, kaj la prudenteco ĝia esenca nuanco kaj fundamento“. Malnova proverbo, sed plena je vero kaj optimismo. Ĉar ĉiam la mondo havas junularon, ĉar ne malaperebla estas la homa prudenteco, do — sunriĉa kaj belaspekta, senĉese disvolviĝanta kaj prosperanta estos la evoluo kaj plisukcesiĝo de nia ekzistado. Estas vaste sciate, ke ju pli optimisma energio kaj raciaj kapablecoj kerne movigas iun ajn agadon, ke ju pli multampleksa kaj varia estas la partopreno de l' junularo en ties enhavo, des pli grandaj, nerefuteblaj kaj ĝojigaj estos la konkludaj atingoj.

Tion lastatempe ankaŭ pruvis la kampanjo en nia Esperanto-movado — „Jaro de la Junularo“, kies organizado rimarkinde antaŭenpuŝis la internacian junularan agadon. Kaj ĉar la utilo kaj efikeco de similaj kampanjoj estas atendindaj kaj nepre bezonataj por plifortigo de la movado, la Estraro de la Bulgara Esperanto-Junularo koincide kun la rekomendo fare de CK de BEA ĝoje anoncas al ĉiuj bulgaraj gejunuloj-esperantistoj kaj societoj pri komenciĝo de nova grandskala Kampanjo en la enlanda movado — „1965 — Jaro de la Bulgara Esperanto-Junularo“.

Konsiderante la ĝisnunajn sperton kaj aktivadon de la Junulara sekcio de BEA kaj ĝiajn porestantajn postulojn rilate la movadon, ni definitive povus ankoraŭ ekde nun esperi je fruktoplana efektiviĝo de la Kampanjo.

Fakte — kiaj estas la ĉefaj taskoj, solvindaj aŭ plenumindaj, de agado kaj aranĝoj, okazontaj dum la jaro 1965-a? Unuavice — oni devas pli intense kaj fervore, racie kaj energie ekagi inter la laborista kaj vilaĝana junularo! La medioj de tiuj gravaj junulaj tavoloj en nia vivo jam dumlonge bezonas pli da atento kaj aktivecoj pere de Esperanto. Ili plurfoje montris konsiderindan emon al lernado kaj disvastigo de la internacia lingvo. Al ĉiu estas konataj la progresema spirito kaj nelimigitaj kapablecoj de la junuloj-laboristoj kaj vilaĝaj gelaboruloj, kies strebo kaj postuloj pri plialtigo kaj pliriĉigo de propraj povoscioj kaj kulturo estas tre fortaj.

Se oni komparas la fariton ĝis nun inter la lernantoj kaj studentoj kun la agado inter la laborista kaj vilaĝana junularo, facile oni faros la saman konkludon — pli da fortoj kaj atento, pli da aktiveco inter tiuj medioj. Kaj estus bonege, se ni harmoniigas en unu kaj saman tuton la porpacajn kaj honestajn ideojn de Esperanto kune kun la nuntempaj konceptoj kaj talentoj de la laboristoj kaj vilaĝanoj, de la tuta entuziasma bulgara junularo. Kompreneble — tasko entute ne tre facila, sed samtempe — nature plenumenda kaj plena je neelĉerpeblaj eblecoj pri agado kaj aranĝoj. Ni ne parolu pri la respektivaj sekvoj de la Kampanjo — ili nerefuteble estos fruktoplana, alportante novajn gejunulajn fortojn kaj bonajn rezul-

tojn por la tuta bulgara Esperanto-movado. Pli aŭtoritate aspektos tiam ankaŭ en internacia skalo la Bulgara Esperantista Asocio kaj BEJ; ĝoje pleniĝos je feliĉo la koroj de tiuj, kiuj kontente konstatas la fruktojn de sia fervora kaj intensa aktiviĝo.

Paralele kun la pliampleksigo sur vasta kampo de la agado kaj atento rilate nian laboristan kaj vilaĝan junularon, neniukaze ni devas preteratenti la nunan esencan kernon de la bulgara esperantista junularo — la gelernantoj kaj la studentaro! Foje oni substrekas, ke la nuna disvolviĝo de Esperanto en tiuj medioj estas kontentiga. Sendube — jes, tamen tuj nepre ni devus emfazi zorgeme, ke la nuna situacio kaj cirkonstancoj tiurilate estas en tia evolua stato, ke kiel neniam aliofoje ili bezonas senĉesan kaj sperte organizitan agadon, atenton kaj fortojn fare de la lokaj societoj, estraroj, unuopaj esperantistoj! Ofte montriĝas bezono por instruistoj de Esperanto, por vigla kaj alloga por novuloj societa vivo kaj medio — amike kora, junule aktivema kaj riĉa je movada pulsado. Tion oni devas konstante memori kaj plenumi en la praktiko.

Estus granda perdo, se ni ne daŭrigas tiel efike kaj volonte nian aktivecon en lernejoj kaj superaj institutoj. La akirita pozicio kaj kampo tie daŭre kaj senlace estu transformitaj en aktivajn centrojn gejunulajn kun stabila poresperanta agado kaj vivo. Tiele la enkonduko de Esperanto en la lernejojn fine atingos efektivigon.

Jen estas la ĉefaj direktoj de la Kampanjo. Sekvas fare de ni ĉiuj la koncernaj agoj kaj aktivecoj. Kaj la postuloj akompanantaj la Kampanjon! Unue — organizado kaj sukcesigo de nia agado laŭ la Plano por 1965 de la Bulgara Esperanto-Junularo, surbaze de la ĉefartikoloj pri BEJ en la lasta numero de „Bulgara Esperantisto“ kaj la cirkuleroj de la Estraro de BEJ tiurilate. Nian ĉiutagecon akompanu la agrabla kaj plena je junula volo kaj obstineco por esperanta laborado — por digna rezultigo de la planita aktiviĝo dum 1965. Ĉiam estu bonvenaj ankaŭ novaj kaj utilaj iniciatoj, regula estu la ligo kun la Sekretariaro de BEJ (Sofia — p. k. 587), ĝustatempe estu konfirmataj la ricevitaj sendaĵoj. Komune kaj iniciateme agante, ni pli facile kaj bone estos vidintaj la deziratajn aspektojn kaj enhavon de la movado ĉe ni.

Due — aparte necesaj kaj instigindaj por la Kampanjo estas — amasa partopreno en la Konkurado, anoncita de la Junulara Sekcio en VRACA kaj pli vasta informado pri Esperanto kaj propagandlaboraj kontaktoj kun la cetera neesperantistaro. Antaŭ ĉio — establigo kaj respektive plibonigo de kunlaboraj ligoj kun lokaj amasaj organizaĵoj — BKP, DKMS, Patrolanda Fronto, entreprenojoj kaj vilaĝaj mastrumoj (TKZS, DZS), Estraroj de lernejoj kaj aliaj kultur-klerigaj organizoj. Freŝaj enfluoj amasigos tiam niajn vicojn. Ĉar la konduto de la ŝtato kaj ĝiaj instancoj en nia lando estas tre favora kaj promesanta sukceson.

De post nememoreblaj tempoj la Nova Jaro estas simbolo pri novaj esperoj, ĝojo, obstina laborado kaj feliĉo. Karaj gekamaradoj, geamikoj — ni ĉiuj pruvu, ke ankaŭ por la esperantistoj la Nova 1965 Jaro estas ne nur simbolo, sed praktika efektivigo de pli grandaj kaj maturaj atingadoj, peranto de entuziasma aktiveco kaj feliĉaj konkludaj rezultoj por la Kampanjo — „1965 — Jaro de la Bulgara Esperanto-Junularo“!

LITERATURA KONKURSO

La Estraro de CK de BEA sciigas al la bulgaraj esperantistoj, ke ĝi organizas literaturan konkurson.

En la konkurso povas partopreni ĉiuj bulgaraj esperantistoj, kiuj deziras.

La konkurso estas sekreta. La manuskriptoj aŭ manuskriptoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu sur fermita koverto, en kiu estu antaŭe metita papero, subskribita per la vera nomo de la aŭtoro kaj ties adreso. La materialojn, kune kun la fermita koverto, oni metu en alian koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo kaj oni adresu ĝin al la adreso de la asocia kancelario — bulv. Ĥr. Botev, № 97, Sofio (p. k. 66).

La tekstoj de la prezentitaj originalaj verkoj aŭ tradukoj nepre devas esti klare skribitaj ĉe maksimuma distanco inter la linioj, kaj la nombro de la linioj ne devas superi pli ol 30 liniojn sur unu paperfolio.

La nombro de la originalaj verkoj aŭ tradukoj ne estas limigita.

La limtempo por la prezentado de la pretaj materialoj estas 31. III. 1965.

La rezultoj de la konkurso estos anoncigitaj en la asocia organo. La premiitaj verkoj estos sinsekve publikigitaj en „Bulgara Esperantisto“.

Ĉiu esperantisto devas profiti la okazon kaj partopreni la konkurson. La rezultoj montros la veran lingvonivelon de la partoprenantoj kaj atestos pri ties kapabloj kaj talento en la afero de la originala verkado kaj tradukado.

La Estraro de CK de BEA rekomencos la sukcesintojn en la konkurso laŭ la jena tabelo:

1. Por originalaj versaĵoj en Esperanto:

1-a premio	—	25 lv.
2-a „	—	20 „
3-a „	—	15 „

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 10 lv.

2. Por originalaj rakontoj en Esperanto:

1-a premio	—	20 lv.
2-a „	—	15 „
3-a „	—	12 „

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 10 lv.

3. Por originalaj mallongaj scenetoj en Esperanto

1-a premio	—	20 lv.
2-a „	—	15 „
3-a „	—	12 „

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 10 lv.

4. Por esperantlingvaj tradukoj de versaĵoj de la klasikaj kaj nuntempaj bulgaraj verkistoj:

1-a premio	—	20 lv.
2-a „	—	15 „
3-a „	—	10 „

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 5 lv.

5. Por esperantlingvaj tradukoj de mallongaj rakontoj el la verkoj de la klasikaj kaj nuntempaj bulgaraj verkistoj:

1-a premio	—	15 lv.
2-a „	—	12 „
3-a „	—	8 „

kaj 3 kuraĝigaj rekompencoj po 5 lv.

6. Por propagandaj artikoloj, verkita en Esperanto laŭ jena temaro:

Esperanto kaj la junularo, Nia movado kaj la ceteraj sociaj organizaĵoj, Esperanto kaj la batalo por paco, Esperanto kaj la bulgara literaturo, La kleriga kaj eduka valoro de Esperanto, Novaj vojoj por propagando de Esperanto, Esperanto kaj la lernejo, Espe-

ranto kaj la scienco, Esperanto kaj la radio kaj televido, Esperanto kaj UNO kaj UNESKO, Esperanto kiel ilo de proksimigo kaj komprenigo inter la popoloj, Vojoj al internacia interkompreniĝo, Politikaj, sociaj kaj psikologiaj faktoroj por kaj kontraŭ la internacia interkompreniĝo, Vojoj de kom-

preniĝo kaj proksimiĝo inter la balkanlandaj popoloj, Morala kodo de la esperantisto k. a.

1-a premio	—	12 lv.
2-a „	—	10 „
3-a „	—	6 „
kaj tri kuraĝigaj rekompencoj po		4 lv.

LA MINISTERIO DE LA POPOLA KLERIGO KAJ ESPERANTO

Hristo Ĝambazki, supera inspektoro en la Ministerio de la Popola Klerigo, salutis la 36-an kongreson en Pleven, dirinte jenon: Je la nomo de la gvidantaro de la Ministerio de la Popola Klerigo mi salutas vin okaze de la 36-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj. Adresante min al vi, mi salutas samtempe la tutmondan esperantistaron, kies modesta kaj pacama movado estas eksterordinare utila por la internaciaj rilatoj. Mi salutas vin kiel adeptojn de la kreita antaŭ 77 jaroj granda movado de D-ro Zamenhof — movado, kiu hodiaŭ progresas konstante en la tuta mondo kaj kiu, ne celante anstataŭigi la neceson de lernado de la naciaj lingvoj, pli kaj pli helpas al la kreaĵoj internaciaj rilatoj per la personaj kontaktoj kaj per la vaste disponeblaj al multaj homoj el ĉiuj rasoj, en ĉiuj partoj de la terglobo, ĵurnaloj, revuoj, gazetoj, arta, politika, scienca kaj alia literaturo, eldonata en Esperanto.

Tiu ĉi kultura movado, laŭ sia pacama karaktero, vekas la simpatiojn de ĉiuj progresemaĵoj homoj en la mondo kaj per sia praktika apliko servas al la paco kaj al la paca kunekzistado inter la popoloj kun malsama sociordo.

La bulgaraj progresemaĵoj socirondoj en la pasinteco havis pozitivan rilaton al la internacia lingvo Esperanto. Ne hazarde en la jaro 1921 ĝi estis enkondukita en la lernoplanojn por la X-a klaso de la realaj gimnazioj, kie oni

instruis la lingvon nedevige po 2 horoj semajne. Sed la manko de speciale preparitaj instruistoj tiutempe ne ebligis la plivastigon de tiu progresiva kaj utila afero en la bulgaraj lernejoj. Tiun ĉi iniciaton la burĝa reĝimo ĉesigis tuj post la ŝtatrenverso fare de la faŝistoj kaj militistoj en 1923.

Nun nia socialisma inteligentularo kaj la Ministerio de la Popola Klerigo havas pozitivan rilaton al la internacia lingvo Esperanto. En la kuranta lernojaro oni studas ĝin nedevige en ĉiuj fakoj de la filologia fakultato ĉe la Sofia Ŝtata Universitato, kaj la lekcionoj tie estas vizitataj ankaŭ de studentoj el ĉiuj altlernejoj en Sofio, kiuj deziras lerni Esperanton. Tiamaniere oni kreas kondiĉojn por preparado de instruistoj-fakuloj ĉe eventuala enkonduko de la lingvo en la lernejojn kiel nedeviga lernobjekto.

Ni konsideras, ke la lernado de Esperanto havos grandan signifon por la edukado de nia junularo en la spirito de internaciismo.

De la klopodoj de ĉiuj homoj kaj precipe de la laboro de la nuna kongreso kaj ankaŭ de la mobilizo de ĉiuj esperantistoj en la mondo dependas la plua estonta propagando kaj vasta evoluado de la movado mem.

Mi deziras sukcesan kaj bonrezultan laboron al la 36-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj en servo al la socialismo, la internacia solidareco kaj la paco en la mondo.

REMEMOROJ PRI LA GRANDA OKTOBRA SOCIALISMA REVOLUCIO

(Daŭrigo de No 12)

Tiu situacio daŭris ĝis ĉirkaŭ la mezo de novembro, 1917, kiam el Kazan aŭ el Niĵni Novgorod alvenis du armitaj maristoj. Ili estis provizitaj per specialaj instrukcioj kaj mandato fare de la Bolŝevista Partio. Ili kontaktiĝis tuj kun la Plenumkomitato kaj post mallonga interkonsultado, en kiu partoprenis ankaŭ Georgi Miĥajlov, la Plenumkomitato proklamis la Sovetan regpotencon en Insar kaj ties distrikto. Kune kun tio, la Plenumkomitato likvidis la Provizoran Registaron kaj liberigis el iliaj funkcioj la organojn de la Registaro, kaj enoficigis siajn komisarojn en ĉiuj institucioj kaj entrepenejoj. Antaŭ tio, la fidelaj al la Plenumkomitato soldatoj de la Revolucio kaj nia partia grupo estis okupintaj ĉiujn pli gravajn postenojn, instituciojn kaj entrepenejojn en la urbo.

Post la proklamo de la soveta regpotenco dum la sekvaj du aŭ tri tagoj okazis tie kaj tie pli malpli seriozaj kolizioj kaj mallongaj pafbataloj kun la kontraŭrevoluciaj elementoj, ĝis kiam la bolŝevista aŭtoritato estis definitive firmigita. Tiam mi kaj Ivan Dejanov kun unu mitralo kaj 50—60 soldatoj de la Revolucio iris al la suda parto de la urbo, kie ni batalis forpuŝante la atakojn de multe pli grandaj trupoj el la garnizono, kiujn la kontraŭrevoluciaj oficiroj sukcesis retenigi tie. Fine, ili ne eltenis, turnis la dorson kaj diskuris ĉiufanken.

Post tio estis formitaj la unuaj 3—4 batalionoj de la Laborista-Kampana Ruĝa Gvardio. Ankaŭ estis formita kaj sendita speciala diverskonsista taĉmento kun granda grupo da propagandistoj, en kiu partoprenis ankaŭ niaj kamaradoj, direkte al la fervojkruciĝoj Ruzaevka kaj urbo Penza. Tiu ĉi taĉmento, kune kun la ruĝarmeaj taĉmentoj, devis partopreni en la senarmigo de la armeaj provizveturigistoj de la kozaka divizio de generalo Krasnov, kiu estis ribelinta kontraŭ la soveta reĝimo, malgraŭ la parolo de honoro donita de la generalo Krasnov al la Soveta Registaro, ke li ne helpas al la kontraŭrevolucio.

Tiamaniere pasis nia restado en Insar ĝis la unuaj tagoj de februaro 1918, kiam el Petrograd tra Moskvo revenis la prezidanto de la Urba Konsilantaro k-do Barabanov, deputito en la Konstitua Asembleo, kiu partoprenis ankaŭ en la Tria Tutruslanda Kongreso de la Sovetoj. Li alportis la ĵurnalon „Izvestija“, en kiu oni anoncis, ke je la 18-a de februaro, 1918, en Moskvo, en hotelo „Drezden“ okazos la Dua Konferenco de la militkaptitoj-socialistoj-internaciistoj. Ni, la membroj de nia studrondo „Revolucio“ kaj ankaŭ membroj de nia Bolŝevista Partia Grupo, decidis, ke nepre niaj reprezentantoj devas partopreni en tiu ĉi konferenco. Ni, du aŭ tri homoj el la grupo esprimis la deziron kaj la firman pretecon partopreni kiel volontuloj en la ĵus kreita Ruĝa Armeo. Kaj pro tio ni decidis, ke tiuj, kiuj estos akceptitaj en la Ruĝa Armeo, estos elektitaj de ni ankaŭ kiel delegitoj ĉe la Konferenco. La atmosfero varmegiĝis kaj je la fino nur kvar homoj de nia grupo, nome Georgi Miĥajlov, Petr Taškov, Ivan Dejanov kaj Spas Dobrev, deklaris kategorie kaj firme, ke ni deziras esti akceptitaj kiel volontuloj en la Ruĝa Armeo. Pro tio, ke nia partia grupo estis malmultenombra — nur el ok personoj — nur unu el ni devis esti delegito ĉe la Konferenco, ni elektis Georgi Miĥajlov kaj ni, la ceteraj tri estis elektitaj kiel liaj kandidat-estraranoj ĉe la Konferenco.

Niaj rajtigiloj estis validigitaj de la Plenumkomitato de la Insara Distrikta Konsilantaro, ĉar tiutempe en Insar kaj ties distrikto la bolŝevista partio ankoraŭ ne havis sian organizacion. Kaj la aŭtentikigo kaj la informoj pri nia partopreno en la Oktobra Revolucio en urbo Insar kaj ties distrikto estis subskribitaj de la prezidanto de la Plenumkomitato k-do Raskin kaj de la distrikta militkomisaro k-do Pjotr Romanov.

Nia kvaropo, provizita per kvar panbuloj kaj peco da fumaĵita lardo, kaj ĉiu el ni havante po kelkaj rubloj en la poŝo kaj nur po unu kostumo sur si, ekiris al Moskvo. Ni luis du glitveturilojn — po du homoj en veturilo — kaj direktis nin al la fervojstacio Kodoŝkino. En Kodoŝkino ni alvenis frostiĝintaj, sed ankaŭ ebriigitaj pro la pura kaj freŝa aero, kaj ankaŭ pro ĉio travivita de ni. Ni tuj komencis rekonsciiĝi Ivan Dejanov per masaĝoj, helpate ankaŭ de aliaj pasaĝeroj en la stacidomo; li rekonsciiĝis, poste ni trinkis teon kaj ekatendis la alvenon de la vagonaro. Post proksimume unu horo kaj duono, la vagonaro aperis, kaj kiam ĝi eniris la terenon de la stacio, ĝi similis ian gigantan monstron, ĉar la eliranta el ĉiu trueto, el ĉiu tubeto vaporo tuj transformiĝis en akvon kaj glaciigis la sekvan momenton. Kaj tiel la tuta lokomotivo de la trajno estis kovrita per glaciaj pli malpli dikaj pendaĵoj, kiuj donis al ĝi tiun strangan aspekton. Krome, la „monstro“ sufokspiregis kaj ĝemegis peze kaj tondre.

De Kodoŝkino ni ekveturis per la vagonaro al Moskvo. Nia veturado ĝis Moskvo daŭris 7—8 tagojn, ĉe pli ol 30 gradojn da frostoj. Dum la tuta tempo ni veturis en „tepluŝki“ (kovritaj ŝarĝvagonoj, malfermitaj pordoj kaj fajro brulanta sur la planko, kovrita per glacio dika

kvar fingrojn). Krome, nia veturado estis treege riskoplena, ĉar ni pasis tra multaj regionoj, kiuj ankoraŭ ne estis okuptaj de la soveta regantaro, kaj en ili furiozis bandoj el eseroj (socialistoj-revoluciuloj), menŝevistoj (socialistoj-oportunistoj), anarkiistoj kaj aliaj kontraŭrevoluciuloj, kiuj, se nur komprenus iel, ke ni estas bolŝevistoj, pafmortigus nin tuj kaj senhezite. Pro tio ni ofte devis apliki diversajn ruzaĵojn.

La 18-an de februaro 1918, je la 3-a horo post la noktomezo, ni alvenis Moskvon. Tie ĉi ni eksciis, ke la Brest-Litovaj intertraktoj pri paco estas interrompitaj kaj ke la germanaj kaj aŭstro-hungaraj armeoj invadis la teritorion de Rusio laŭlonge de la tuta fronto kaj rapide antaŭeniras. Pro tio la delegitoj ĉe la Konferenco el Petrograd kaj el iuj aliaj regionoj devis malfruigi kaj tial la Konferenco estis prokrastita per du-tri tagoj.

En Moskvo ni estis registritaj, enskribitaj por enloĝigo kaj nutraĵo, provizitaj per la necesaj dokumentoj kaj aligitaj al la Unua Moskva Internaciisma Bataliono, kiu troviĝis sur „Arbatskaja Ploŝad“ en la kazernoj de la Ĉefstabo de la Ruĝa Armeo.

La Konferenco daŭris de la 20-a ĝis la 22-a de februaro, 1918, en hotelo „Drezden“. En ĝi plej aktive partoprenis nia bulgara grupo per sia delegito Georgi Miĥajlov. Li voĉlegis argumentitan deklaron je la nomo de la bulgaraj revoluciaj socialdemokratoj (antaŭuloj de la bulgaraj komunistoj) kaj ties simpatiantoj en la 13-a Bulgara Diverskonsista Divizio kaj militkaptitaj ĉe la fronto de Seret en Rumanio je la 11-a de aŭgusto, 1917. Nia deklaro estis unu el la plej grandamplaksaj kaj unu el la plej bone argumentitaj ĉe la Konferenco, en kiu ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la Bolŝevista Partio.

Post dutagaj diskutoj, dum kiuj estis eldiritaj tre interesaj opinioj kaj konceptoj, la Konferenco decidis kaj fondis „Internacian Organizacion de la Revoluciaj Fremdlandaj Laboristoj kaj Kampanoj en la RSFSR — eksaj „Militkaptitoj-Internaciistoj“. En tiu organizacio k-do Georgi Miĥajlov okupis unu el la plej ĉefaj postenoj kaj ludis gravan rolon dum ĝia funkciado, kiam ni estis en Moskvo kaj ĝis nia reveno en Bulgarien. Tie ĉi, en Moskvo, en la komenco de aprilo 1918, ni partoprenis vive ankaŭ en la kampanjo por senarmigo de la anarkiistaj bandoj, kiuj estis ribelintaj kontraŭ la Soveta reĝimo.

En Moskvo ni laboris kelkajn tagojn en la Buroo de la Ruĝa Armeo. Post tio ni estis dividitaj en du grupojn: en unu el ili — Georgi Miĥajlov kaj Spas Dobrev, kaj en la alia — Petr Taŝkov kaj Ivan Dejanov. Al ni kunhelpis ankaŭ aliaj kamaradoj militkaptitoj-socialistoj internaciistoj kaj ni ĉiuj estis komisie senditaj en diversajn regionojn de la provinco — la unua grupo al Saratov, kaj nia grupo — suden al Rostov na Don kaj Taganrog, por ke ni vizitu ĉiujn tendarojn de militkaptitoj, celante fondi lokajn filiojn de nia internacia organizacio kaj altiri volontulojn el inter la militkaptitoj por la internaciaj batalionoj de la juna Ruĝa Armeo. La tiele formitaj de ni internaciaj batalionoj tuj ekiris al la fronto kontraŭ la invadintaj germanaj kaj aŭstro-hungaraj trupoj.

Post kiam ni revenis en Moskvon, je la fino de majo, 1918, ni ĉiuj tri — Petr Taŝkov, Ivan Dejanov kaj Spas Dobrev, estis akceptitaj kiel membroj de la Bolŝevista Partio, kaj Georgi Miĥajlov estis akceptita kiel membro jam ĉe la Konferenco aŭ tuj post ĝi. Kaj post nia reveno en Bulgarien, mi fariĝis membro ankaŭ de nia Partio, en la komenco de 1919.

Je la 30-a de junio, ni, la kvar kamaradoj, membroj de nia Bolŝevista Grupo, kun la scio kaj la aprobo de la respektivaj organoj de la Bolŝevista Partio, forveturis kaj revenis Bulgarien, post kiam ni restis kvarantenigitaj preskaŭ tutan monaton en Varsovio, kiu tiutempe estis okupita de la germanoj. De tie, tra Germanio, Aŭstrio, Hungario kaj Serbio ni revenis Bulgarien. Tie ĉi ni fariĝis objekto de humiligaj pridemandoj en la Militkomandejo en Sofio, en la Direkcio de la Polico kaj en la Ministerio pri la Milito, kaj de unu loko al alia oni kondukis nin eskortitaj de soldatoj kun fusiloj. Kaj la kaŭzo de ĉio ĉi estis, ke ni revenis de la revolucia Sovet-Unio. Fine, post 4—5 tagoj oni sendis nin al niaj rotoj ĉe la fronto, ĉar la milito ankoraŭ furiozis.

Nia celo estis, tuj post nia reveno en niajn rotojn ĉe la fronto organizi sekretajn revoluciajn kernojn por agitado kaj propagando por revolucia ĉesigo de la imperiista milito. Sed baldaŭ sekvis la frontobreĉo ĉe „Dobro Pole“, kaj ne longe post tiu evento venis ankaŭ la fino de la milito.

El ĉio travivita en la revolucia Rusio ni konvinkigis, ke por la sukceso de la revolucio estas necesaj krom la materialaj kondiĉoj ankaŭ bona organizado kaj multaj konoj, sed ne malpli estas necesaj granda idealismo, entuziasmo kaj preteco morti.

CK de BEA jam dissendis la foliojn por kolekto de subskriboj en la peticio al UNO okaze de „La Jaro de Internacia Kunlaborado“. Komencu viglan agadon kaj partoprenu plej aktive en la Kampanjo!

KIAM ONI KONSTRUIS LA FUNDAMENTOJN

de Penju Penev

Finestingados sunsubiroj, homoj
kaj rememoroj, sentoj, revoj mil;
finfloros l' akacioj antaŭ domoj,
vespera vent' ekflustros kun facil'.

La viv' de ni ja sian parton prenos
kaj gaje kantos kiel gutotint',
post tempo kiam posteuloj venos
ĉi tie inde anstataŭi nin.

La korojn ili en poemoj himnos
kaj ree birdoj nestojn plektos jen
kaj ĉiam tiel sur patrino sino
id' ora-stel' brilados en seren'.

Cejano kaj violoj estos ree
kaj ree — ties blurigard' en mol',
sed estos homoj tiam jam aliaj,
alia estos tag' de l' patra sojl'.

Al idoj ĉu rakontos freŝmemore
aŭ silentados daŭre histori'
pri la esper' ŝprucinta el la koroj
per larm' verŝita je serena stri'.

Kaj kiel ŝanĝis ni kun kamaradoj
lastbombon per betona ĉarpentaĵ',
kaj poste el ĝi nia ĝojo arda
kreskadis ja etaĝo post etaĝ'.

Ni kiel dudekkvin jaraĝaj estis,
kaj niaj haroj kovris la arĝent'!
Kaj kiel ne por etfeliĉ' honeste,
ni marŝis sur la roso de l' maten'.

Vi, posteuloj, vane foliumi pretos
apenaŭ vi ekscios ĝis la fin'
la fundamentojn kiam oni metis
ja kian vivon vivis ni.

Ho, kiam la obstakloj nin sufokis,
tre enviinda estis nia voj'.
Ne vivis tagojn ni kaj nek epokon,
ni vivis en batalo ja kun ĝoj'.

Tradukis: Nikola PILEV

ĜIS REVIDO . . .

de Hr. Gorov — Ĥrima

Vi alveturis, geamikoj,
el greka urb' Tesaloniko,
kiam forflugis la hirundoj
trans mar' Egea al la sudo . . .

Ni ja renkontis kiel fratojn
vin, kvankam estis nekonataj.
Vi ŝuldis tion al verdstelo —
ĝi brilis pace sur mantelo.

El ĉarma lando de l' olivoj
eksonis Zamenhofa lingvo . . .
Kaj ni komprenis sen obstaklo
vin grekojn — nepojn de Heraklo.

Do — Esperanto ne ĥimero,
sed paciganto en kvereloj,
rimed' unika por najbaroj
en paco vivi dum miljaroj . . .

Vi alveturis, geamikoj,
el greka urb' Tesaloniko . . .
Vi venis kun esper' kaj fido . . .
Do ĝis revido! Ĝis revido!

AMIKECO

de Ŝinka Filaretova

Radias ĝi per sia brilo hela
tra l' tuta mond', en ĉiu terangul',
penstras en la korojn tra l' nebul'
de la malam', malfido kaj ŝancelo.

Kaj portas sin viviga ĝia voko
en la kamparoj, urboj kaj tra l' spac',
forigas ĝi la fortojn de l' minac',
la timon kaj la dubon de l' epoko.

Jen, firme homoj blankaj, nigraj, flavaj
en alianc' majesta sur la ter',
en la batal' por paco kaj liber'
etendas manojn kun impeto brava.

Jam proksimiĝas nia venko fina —
triumfo de la pac' kaj amikec',
kaj la popoloj kreos en progres'
la novan mondon de feliĉ' senlima.

ĈU VI SCIAS, AMIKO ?

de K. Gusev

Amiko, ĉu vi scias novan forton,
per kiu disrompiĝas olda baro,
kaj kiu al mutulo donas vorton,
inter fremduloj faras vin najbaro ?

Amiko, ĉu posedas vi pafilon,
per kiu vi mortigas la silenton,
el fremda knabo faras vian filon,
el plumba nubo sunan firmamenton ?

Amiko, ĉu allogas vin armilo,
per kiu oni ligas la militon,
el ĝi penante fari por jarmilo
kaj por eterno teran ekziliton ?

Amiko, ĉu al vi imponas verdo
de herbo, de espero, de mateno ?
Do montru tion tuj, sen tempoperdo,
per viaj penso, ago kaj sinteno !

Sen vana meditado filozofa,
kun ni eliru sur la mondan placon
postuli en la lingvo zamenhofa
de la militemuloj: Pacon! Pacon!

Amiko, tio estas via digno,
subaĉetebla per nenia mono —
per nova, armo — per komuna lingvo
batali tuj por la homara bono !

Moskvo, 1964

BAGATELAJ EROJ

La kelnero similas al eĥo; li respon-
das, sed ne venas.

*

La ĝentileco estas arto kaŝi antaŭ
la homoj vian sinceran opinion pri ili.

*

La lango estas la sola akra instru-
mento kiu ne eluziĝas pro longa uzo.

*

En la mondo la nombro de la idea-
laj virinoj ĉiam korespondas al la nom-
bro de la enamiĝintaj viroj.

Ne estas necese esti granda filozofo por malkovri, ke la 77-jara sindona laboro de miloj da fervoraj esperantistoj donis ĝis nun tre, tre magran rezulton. Tio estas pli ol evidenta.

Pli malfacile estas diagnozi la malsanon de nia movado.

Kio kaŭzas la amasan forfaladon de niaj adeptoj?

Post 35-jara aktiva laboro sur ĉiuj niveloj de nia movado, kaj post plurjara dediĉiĝo al la problemoj, mi kredas povi respondi al la demando.

Ni propagandis la lingvon kaj instruis ĝin, kaj ekzercis ĝin en niaj fermitaj rondetoj. Ni ĉiam esperis, ke la rondetoj pligrandiĝos, kaj sub la premo de la Esperanton parolanta publiko, ankaŭ la publikaj servoj devos ekuzi ĝin. Sed tio ne okazis. Al nia esperantlingva demando la poŝtoficejo, konduktoro, doganisto, bankoficejo kaj turistgvidisto respondadis en kvar aliaj lingvoj, sed neniam en Esperanto.

Trovinte ke la lernita lingvo havas tre malgrandan praktikan utilon, multaj el niaj adeptoj — la esence praktikaj homoj — sentis sin iel trompitaj, kaj forlasis la movadon. Restis nur la idealistoj, kiuj konsistigas nur malgrandan parton de la homaro.

La diagnozo per si mem difinas ankaŭ la rimedon. Ni devas daŭrigi la ĝisnunan laboron, sed samtempe ni devas entrepreni urgajn paŝojn por la enkonduko de Esperanto en la fakojn, kie ajn interkompreniĝado inter diversnaciaj estas necesa.

Jes, eĉ se sonas ambicia, aŭ eĉ fantazia la plano, Esperanto povas venki nur tiel, se ni **samtempe** eklaboras por enkonduki ĝin en ĉiujn, aŭ almenaŭ multajn fakojn de la homaj aktivecoj: turismo, trafiko, informado, artoj, sciencoj, sportoj, diplomatio kaj interŝtataj rilatoj, komerco kaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj. Ĉiuj

el tiuj ĉi havas plurajn subfakojn, kaj en ĉiuj ili ni devas eklabori. Kaj nenion ni atingos se ni forte eklaboras en iu fako en unu difinita lando, se oni nenion entreprenas en almenaŭ deko da aliaj landoj pri la sama fako. Pro tio, samtempa agado **en multaj landoj** estas kondiĉo.

Ne temas pri kreado de novaj fakaj asocioj. Temas pri kampanja laboro, kun difinita daŭro. Ekzemple dekjara daŭro. Tempo ĝuste sufiĉa por plenumi la nekredeblan taskon.

Por transformi la neeban en eban, la laboro en ĉiu fako kaj en ĉiu lando devas esti bone planita, kaj la tuta kampanjaro perfekte kunordigita. Nur tiel povas la agantoj en unu fako profiti la sukcesojn atingitajn en ĉiuj aliaj fakoj.

Ankaŭ ĝis nun multaj personoj faris klopodojn por la enkonduko de Esperanto en diversajn fakojn. Sporade kaj kelkloke eĉ interesaj sukcesoj estas atingitaj, ĉefe dank' al la personaj meritoj de niaj batalantoj. Kaj se hodiaŭ, post 77-jara laboro eĉ ne unu el la multaj fakoj adoptis Esperanton, ne kulpas pro tio la personoj, kiuj batalis por tiu celo, sed la manko de ĝenerala plano por ĉiuj fakoj, kaj kunordigo de laboroj en la diversaj fakoj kaj en multaj landoj.

Iuj diras: „Enkonduku Esperanton unue en la pacmovadon aŭ en geografion aŭ en turismon, kaj post kelkaj jaroj, kiam vi sukcesos, komencu labori en alia fako“. Tia pensmaniero estas utopia. La vero estas, ke la poŝtoficejoj lernos Esperanton ne por si mem, sed por siaj klientoj: la ĵurnalistoj, turistoj, geografoj, sportistoj, kiuj pli aŭ malpli frue estos iliaj klientoj. Kiam ni povos diri al la poŝtistoj, ke ĉiuj aliaj fakoj laboras pri la enkonduko de Esperanto, nur tiam ili eklernos ĝin. Kaj la sama estas la kazo

ankaŭ en ĉiuj aliaj fakoj. **Samtempeco** estas do kondiĉo por sukceso.

Ne estas eble en la kadro de tiu ĉi artikolo doni detalojn pri planoj, des pli, ĉar krom la ĝenerala plano ekzistas apartaj kondiĉoj en ĉiu fako kaj en ĉiu lando, kiuj devas esti aparte pristudataj. En ĝeneralaj trajtoj la programo estas jena. Dum kvar jaroj ni preparos la medion en ĉiuj fakoj por la akcepto de Esperanto. La kvina jaro estos la jaro de la interŝtataj konvencioj. La sekvontaj kvin jaroj estos dediĉitaj al la fakta efektivigo de la konvencioj, t. e. la fakta enkonduko de Esperanto.

Ĉar kiel vi povis konjekti, ne temas pri revoj aŭ bonaj deziroj. Temas pri laborprogramo por la proksimaj dek jaroj. Mi ĵus entreprenis ĝin kune kun granda grupo da esperantistoj kiuj fidas ke tia ĉiuflanka, samtempa, energia kampanja agado povos — kune

kun la ĝisnuna labormetodo — alkonduki al la transformo de neeblo en eblan.

En la lastaj du kongresoj de UEA kaj en multaj aliaj okazoj mi diskutis tiun ĉi projekton kun granda nombro da esperantistoj. El ĉiuj flankoj, de elstaraj kaj de simplaj esperantistoj mi ricevis grandan nombron da aproboj kaj stimuloj, kaj multaj sin proponis por en tiu ĉi promesplena projekto.

Pere de tiu ĉi artikolo mi alvokas ankaŭ vin al kunlaboro. Se vi fidas ke energia kaj bone gvidata kampanjo povas alkonduki al la celo, bonvolu sciigi al mi viajn ideojn, kaj eventuale via pretecon kunlabori kun ni por la atingo de la fina celo ankoraŭ dum nia vivo. Se vi havas preferon por labori en difinita fako, anoncu al mi ankaŭ tion, al la suba adreso.

Tibor Sekelj
Pop Lukina 1.
Beograd — Jugoslavio

NIA ORA JUBILEO

Nia meritplena s-ano Oskar Berman fariĝis la unua dumviva membro de Esperanto-Ligo Izraela. Ankaŭ dum la kuranta jaro plenumiĝos kvindekjaro de lia esperanta agado. Tial estos ĝuste dediĉi al li tiun ĉi artikolon.

S-ano Oskar Berman naskiĝis kaj multajn jarojn pasigis en la pola industria urbo Lodz.

Tie dum pluraj jaroj li estis prezidanto de Lodza Esperantista Societo kaj interalie dum 15 jaroj gvidis semajnan paĝon pri Esperanto en germanlingva gazeto. Ankaŭ li aperigis artikolojn en aliaj lodzaj kaj varsoviaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj poste en izraelaj kaj eksterlandaj gazetoj.

De la jaro 1933 ĝis sia forveturo Izraelon en 1939 s-ano Berman estis vicprezidanto de Varsovia Esp.-Societo kaj gvidanto de la Esp.-Rondo ĉe Juda Turista Societo en Polujo.

Veninte en Izraelon kiel turisto en

1934 li partoprenis la solenan inaŭguron de la Zamenhofa strato en Tel Aviv. Nuntempe estas 10 Zamenhofaj stratoj en Izraelo.

Ankaŭ en Izraelo li aktive partoprenis la esperantan movadon.

S-ano Oskar Berman ĝis nun partoprenis 10 Universalajn Kongresojn de Esperanto, landajn polajn kongresojn kaj jarajn konferencojn de Esperanto-Ligo Izraela. La jubileulo loĝas nun, 49 Tarna strato, Hadera, Izraelo.

Al nia kara Oskar Berman, kiu nun festas duoblan jubileon: kvindek jarojn de la fruktodona esperanta agado kaj dudek kvin jarojn de estado en Izraelo ni deziras multajn jarojn en sano, bonstato kaj feliĉo kun lia edzino Doria kaj pluajn sukcesojn en la esperanta movado, kies fidela ano li ĉiam estas.

Magister Isaj Drafver
Prezidanto de ELI

JUNA ESPERANTISTO



Varma maro!

Vastaj sunoriĉaj strandoj!

Internacia gejunula medio!

Varia kultura programo!

Prelegoj kaj diskutoj en Esperanto

pri interesa temaro

Ĉiuvespera dancado!

Speciala vespero pri Esperanto!

Karnavala festo de Neptuno!

Abundaj manĝaĵoj!

Ĉion ci vi trovos en **PRIMORSKO** ĉe la Nigra Maro
inter la **20-A KAJ 31-A DE JULIO 1965** en la

DUA INTERNACIA SEMINARIO KAJ FERIOSEMAJNO,

AL KIU AFABLE INVITAS VIN BULGARA ESPERANTO-JUNULARO

La temo. Donante kontribuon al la internacia kampanjo "1965 — JARO DE INTERNACIA KUNLABORADO", ni fiksas tiun sloganon, kiel ĉefan temon de nia seminario. Prelegos eminentaj bulgaraj esperantistoj kaj fakuloj. La seminario programo ampleksos 3—4 posttagmezojn de la dusemajna restado en Primorsko, dum la ceteraj tagoj estos rezervitaj je sportaj, belartaj k. a. aranĝoj, ekskursoj kaj simpla feriumado.

La kotizo, kiu inkluzivas plenan pensionumon kun partopreno en ĉiuj aranĝoj de la seminario-feriosemajno, estas 2,50 Dol. potage, se oni loĝas en tendoj, kaj 3,50 Dol. — en komfortaj bangaloj. Eblas ankaŭ malplilonga aŭ plilonga restado en la tendaro ĉiam laŭ la sama taga kotizo. La kotizoj estas sendandaj al **konto № 46018** — Bulgara nacia banko, Sofio, kun aparta indiko: „por Esperantista Seminario“.


Kiel aliĝi. Por aliĝi sendu simplan aliĝilon (laŭ aldonita modelo) al **Bulgara Esperanto-Junularo, p. k. 587, SOFIA**. Lasta limdato por aliĝo — 30. VI. 1965, sed pli frua anonciĝo konsilinda. Ĉiu bulgara konsulejo donas turisman vizon por eniro en la landon senprokraste kaj sen iu ajn formalajo.

Ni atentigas al interesigantoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Jugoslavio kaj Sovet-Unio, anonci sin ĉe la respektiva Buroo pri Junulara Turismo, kiu peros la organizon de grupoj al Primorsko (vd. adresliston aparte).

Kiel veturi. La tendaro situas 50 km sude de Burgas, de kie veturas aŭtobusoj kaj ŝipoj al Primorsko. Estas konsilinde antaŭanonci vian alvenon en Burgas je grupo, ĉar tiam oni povas organizi la veturadon de la stacidomo de Burgas ĝis la tendaro mem, per la propraj aŭtobusoj de la Tendaro. Veturkostoj ne inkluziviĝas en la kotizo.

- Ĉeĥoslovakio:** Ustředni výbor československého svasu mládeže
PRAHA-3, Náměstí Maxima Gorkeho, 24.
- GDR:** „Jugendtourist“
BERLIN N 4, Fridriĥstr. 110—112
- Hungario:** „Express“
BUDAPEST — V, Szabadságtér 16.
- Jugoslavio:** Travel Departement of Yugoslav Youth and Students
BEOGRAD, Moše Pijade 12/1
- Pollando:** WARSZAWA, ul. Ordynaska 9
Союз польских студентов. Бюро отдыха путешествии и туризма
WARSZAWA, 61, Al. Róż 2
Бюро задграничного туризма молодежи
- Sovet-Unio:** Бюро международного молодежного туризма
„СПУТНИК“
ул. Кропоткина 10, Москва Г-34

Kial tiu Seminario-Feriosemajno estas aparte vizitinda? Ĉar ĝi estas unu el la malmultaj esperantistaj renkontigoj (se ne la unika), kiu okazas en medio de pli ol mil samtempe feriumantaj gejunuloj diversnaciaj. Ĉu vere tio ne estas ideala laborkampo por nia informado; por esplori la lingvajn problemojn de la nuntempa junularo tiajn kiaj ili efektive estas; por enketi la opinion pri Esperanto de junuloj plej diversaj laŭ nacieco, klereco kaj socia pozicio; por pruvi la praktikan utilon de Esperanto kaj manifesti ĝian funkciadon ĉe la diskutado, ĉe la amuzado kaj . . . ĉe la amindumado.





Por vi kiuj neniam antaŭe estis en Primorsko estus interese ekscii ke ĝi estas junulara ripoztendaro situanta ĉe pitoreska golfo ĉirkaŭita de ombroriĉa arbaro. Nur kelkdek metrojn de la vasta strando troviĝas aro da konstruaĵoj, kiuj formas la centron de la ripozejo: granda restoracio kun apudaj vastaj terasoj por ripozo kaj babilado, impona salono por la vesperaj amuzoj kaj kulturaj programoj kaj kafejo sub ĝi, parte subĉiela, butikoj kaj sportejoj. En la ombro de la apuda arbaro kaŝiĝas tuta vilaĝo el tendoj sespersonaj, kun litoj kaj elektra lumo en ili kaj komfortaj bangaloj.

Speciala kurso por komencantoj estos organizita, se aperos interesiĝantoj. Bv. anonci vin per la aliĝilo.

A L I Ĝ I L O

sendenda al: BULGARA ESPERANTO-JUNULARO, SOFIA-C, p. k. 587, Bulg.
 Mi aliĝas al la DUA INTERNACIA SEMINARIO KAJ FERIOSEMAJNO de
 BEJ en Primorsko de la 20-a ĝis la 31-a de julio 1965 kaj mi pagas la kotizon de
 . . . dol, por . . . tagoj, per . . .

Nomo: **Adreso:**

Naskiĝdato: **Sekso:** **Profesio:**

Mi deziras partopreni en kurso de Esperanto por komencantoj.

Loko kaj dato: Subskribo:

ALVOKO

al ĉiuj junularaj grupoj kaj studentaj societoj en Bulgario
pri kamaradeca KONKURADO surkampe de la
Esperanto-movado

Ni, la membroj de la Junulara Grupo en Vraca, ĉiutage agante por la bonegaj ideoj de Zamenhof-

ALVOKAS ĈIUJN JUNULARAJN GRUPOJN KAJ STUDENTAJN SOCIETOJN
EN LA LANDO AL NOBLA KAMARADECA KONKURADO LAŬ LA
JENAJ INDIKOJ:

1. Nombro de gvidataj Esperanto-kursoj por junuloj kaj lernantoj.
2. Varbado de novaj memboj.
3. Pago al BEA de 100% membrokotizo.
4. Kulturkleriga aktivado: prelegoj, lokaj radioelsendoj, murgazetoj, ekspozicioj, abono al „Bulg. Esperantisto“, artensemblaj rondoj.
5. Kulturamasa agado: gastrenkontiĝoj, ekskursoj, naciaj manifestacioj korespondado, vesperoj de la letero k. s.
6. Lingva posedo: kursoj por perfektigo, por instruistoj de Esperanto, partopreno en konkursoj pri lingvoscio, literaturaj k. a.
7. Eldonado de loka junulara bulteno.
8. Renkontiĝoj kun veteranoj de la movado, alilandaj gastoj.
9. Ĝenerala partopreno en la aktivado de Bulgara Esperanto-Junularo kaj ties kampanjoj.

Ni proponas, ke la Konkurado estu gvidata de la Estraro de Bulgara Esperanto-Junularo!

Gejunuloj, al fervora poresperanta agado dum 1965!

Sekretario: B. Mladenov

Prezidanto E. Daskalov

Grave! Grave! Grave!

La Estraro de Bulgara Esperanto-Junularo ĝoje sciigas vin, ke la tradicia TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA FESTIVALO ĉi-jare okazos en la „Urbo de la Juneco“ — Dimitrovgrad, je la 2, 3, 4. IV. 1965.

Ĉiuj junularaj grupoj kaj studentaj societoj tuj komencu sian preparadon por plej digna prezentiĝo! Atendu la Oficialan Informilon kaj sekvantajn detalojn!

La geesperantistoj, kiuj ne sukcesis aboni la revuon „BULGARA ESPERANTISTO“ pere de REP, povas fari tion sendante la abonpagon rekte al la Asocia kancelario.



JUNULARAJ NOVAĴOJ

Lastatempe okazis tre utilaj kaj reciproke profitodonaj kunsidoj inter reprezentantoj de la Bulgara Esperanto-Junularo kaj tiaj de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (JEJA), Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj Hungara Esperanto-Junularo (HEJ).

*

En Budapeŝto kaj Beograd la Sekretario de BEJ Dimitr Ĵdrakov kunsidis kun respondecaj estraranoj de HEJ kaj JEJA. Post daŭra pritrakto de starantaj antaŭ niaj organizaĵoj taskoj kaj interŝanĝo de sperto kaj opinioj pri la junulara movado estis subskribitaj koncernaj protokoloj por estonta vigla kunlaborado kaj plifirmigo de la rilatoj surkampe de E-agado inter BEJ kaj JEJA (resp. HEJ). Cetere estas planitaj laŭeble pli amasaj prezentiĝoj de BEJ kaj JEJA en koncernaj enlandaj kaj internaciaj aranĝoj esperantistaj, interŝanĝo de presorganoj, vizitoj, interŝanĝo de junularaj ekskurso-grupoj k. a.

*

En Sofio gastis malgranda delegitaro de GEJ kun gvidanto U. Lins — kasisto de TEJO. Inter la germanaj amikoj kaj la Sekretariaro de BEJ same okazis kunsido pri la supremenciitaj demandoj kaj subskribita protokolo por regula kaj efektive reciproka utila kunlaborado. Poste la reprezentantoj de GEJ vizitis niajn urbojn Varna kaj Vraca, ekskursante kaj gaste al la lokaj junularaj grupoj. Jen la opinio de s-ro Ulrich Lins pri ilia gastado en Bulgario: „Mi certe neniam forgesos mian restadon en Bulgarujo, kiu tre bedaŭrinde estis nur mallonga kaj tamen tiom plaĉis al mi, ke jam hodiaŭ mi senpacience atendas la tempon, kiam mi refoje vizitos pli longe vian belegan landon. Mi estas feliĉa, ke mi havas tiom da geamikoj en Bulgario.

Akceptu miajn tre korajn kaj sincerajn dankojn!“

*

BEJ sciigas, ke jam estas ricevitaj la unuaj sendaĵoj de kursanoj partoprenantoj en la Konkurso — „Lernanta pentraĵo“ je temo — „Mia naskiĝloko“! Ĉiuj lokaj aktivuloj kaj kursgvidantoj pli intense preparu ankaŭ partoprenon de siaj junaj verdstelanoj en „Lernanta pentraĵo“!

*

Gejunuloj, ĉu vi jam kolektas subskribojn por la Kampanjo „Jaro de la Internacia Kunlaborado“? Ĉiuj membroj de la Bulgara Esperanto-Junularo kompleze kaj grandskale helpu la Kampanjon pere de la lokaj societoj! La Estraro de BEJ amike bondeziras ĉiurilate al vi sukceson kaj fruktodonan aktivadon!

*

„Kompreneble“ — estinta organo de Bulgara Esperantista Studentaro — post koncerna decido de CK de BEA, eniras la paĝojn de „Bulgara Esperantisto“. Samtempe la RK disponigos pli da paĝoj por junularaj temoj. Do, karaj gejunuloj kaj gestudentoj, amase abonu al nia Esperanta organo kaj ŝatata legaĵo — „Bulgara Esperantisto“.

Gvidantoj de lokaj Junularaj Grupoj kaj Studentaj Societoj, junaj entuziasmoj-esperantistoj, ni aktive kaj per daŭra kunlaborado plibonigu, pliriĉigu kaj plivariigu la junularajn paĝojn de „Bulgara Esperantisto“, por ke ĝi efektive estiĝu nia utila presorgano kaj serĉata esperanta legaĵo!

*

De ĉiu loka Junulara Grupo kaj Studenta Societo po unu regula korespondanto al „Bulgara Esperantisto“! Anonciĝu rekte al: P. K. 587, BEJ — Sofia! Disvastigu kaj abonigu nian organon „Bulgara Esperantisto“!

GRAVA SCIIGO PRI LA JUNPIONIRAJ GRUPOJ

- 1) Ĉiuj E-societoj en la lando, ĉe kiuj estas organizitaj junpioniraj E-grupoj aŭ rondoj por lernado de Esperanto, devas sendi al BEA la jenajn informojn:
 - a) Nombro de la anoj de la E-grupo aŭ rondo.
 - b) Organiza vivo: estraro, membrokotizo, kunsidoj.
 - c) Kulturkleriga agado: amatoraj artotrupoj, efektivigitaj aŭ planitaj aranĝoj: renkontoj, vizitoj, ekskursoj, solenaĵoj k. a.
 - d) Je kia nivelo estas la E-korespondado de la junpioniroj kun la infanoj el la lando kaj eksterlando.
 - e) Malfacilaĵoj, kiujn oni spertas.
- 2) Ĉiu societo difinu respondeculon, kiu kontaktigu kun la respondeculinoj por la junaj esperantistoj Rajnova kaj Popova, por ke oni organizu planitan efektivigon de la laboro. La adreson de la elektita respondeculo oni sendu al BEA.
- 3) La materialojn, rilatantaj la agadon inter la junpioniroj, oni sendu al BEA tute aparte de la aliaj materialoj, kiuj koncernas demandojn, tuŝantaj la societan agadon, por ke oni povu sistemigi ilin kaj ke ili estu materialo, el kiu oni povas ĉerpi informojn pri la junpionira E-movado.
- 4) Oni organizu kursojn kaj rondojn tie, kie ĝis nun ne estas malfermitaj. Oni organizu junpionirajn grupojn.
- 5) Oni plifortigu kaj organizu la kulturklerigan agadon.
- 6) Oni organizu kaj aktivigu la E-korespondadon inter la junpioniroj en la lando kaj eksterlando. La plej interesajn leterojn oni sendu al BEA al la respondeculinoj.

* * *

Junulino konfesas al sia intima amikino:

— Hieraŭ mi konatiĝis kun ekstreme interesa sinjoro. Juna, nekredeble milda, tenera, inteligenta kaj super ĉio — poeto. Li kisis min kaĵolante al mia orelo: viaj ĉarmaj lipoj, karulino mia, similas al freŝaj folioj de maja rozo, kovritaj de frumatena roso!

— Ah, mi konas lin — interrompis ŝin la amikino. Li estas Filipo! . . .

* * *

Patro kondukis sian filon al promonado. Survoje ili renkontis taĉmenton de soldatoj. La patro demandis:

— Diru, filo mia, kiuj estas tiuj homoj?

— La fianĉoj de la servistinoj . . .

НОВИ УСПЕХИ НА МЛАДЕЖИТЕ ЕСПЕРАНТИСТИ ВЪВ ВРАЦА

Враца — градът на 19-ия световен есперантски младежки конгрес — живее ежедневно с идеите на есперантското движение.

На последното си заседание младежката група реши да поиска от отдел „Народна просвета“ в града въвеждането на есперанто в училищата като факултативен учебен предмет. Започна се усилена разяснителна работа по училищата. Изнесоха се много беседи от Еньо Даскалов и Бойчо Младенов и се събраха 400 молби на ученици, които желаят да изучават факултативно международния език есперанто.

На 15 октомври отдел „Народна просвета“ при Окръжния народен съвет с писмо № III 1901 разреши факултативното изучаване на есперанто, както следва:

1. В Техникума по текстил — в 3 курса за начинаещи — с ръководител Еньо Даскалов.
2. В Техникума по текстил — в 2 курса за напреднали — с ръководител Еньо Даскалов.
3. В Техникума по облекло — в 2 курса за начинаещи — с ръководител Еньо Даскалов.
4. В Техникума по механотехника — в 3 курса за начинаещи — с ръководител Радослав Тричков.
5. В I-ва гимназия — в 1 клас за начинаещи — с ръководител Бойчо Младенов.
6. Във II-ра гимназия — в 2 класа за начинаещи — с ръководител Бойчо Младенов.
7. Във II-ра гимназия — в 1 клас за напреднали — с ръководител Бойчо Младенов.

Наблюдавайки големия успех на есперантското движение и други младежи желаят да изучават есперанто. Младежката есперантска група реши да открие още следните курсове:

1. Градски курс — за начинаещи — с ръководител Радослав Тричков.
2. В Техникума по текстил — за начинаещи — с ръководител Дим. Сертов.
3. В Техникума по текстил — за начинаещи — с ръководител В. Белорешки.
4. В Художествения ансамбъл — курс за напреднали — с ръководител Еньо Даскалов.
5. В Медицинския техникум — за начинаещи — с ръководител Р. Тричков.
6. В Учителския институт — за начинаещи — с ръководител Г. Близнашки.
7. Градски курс — за напреднали — с ръководител Р. Тричков.
8. В Техникума по текстил — за учители-начинаещи — с ръководител Еньо Даскалов.

Работата за привличане на нови есперантисти продължава. Досега броят на включените в курсовете и в часовете за факултативно изучаване надхвърля цифрата 500.

Есперантистите от град Враца са решили твърдо да увеличават своите редици, да запазят авторитета, получен по време на 19-ия конгрес на ТЕЈО.

Еньо Даскалов

Председател на младежката есперантска група
Враца

SOFIO. Je la 2-a de oktobro 1964 estis fondita ĉe societo „Maksim Gorkij“ en Sofio gelnanta esperantista grupo „Ĉiam antaŭen“ kun 15 membroj. La grupo faras siajn kunvenojn ĉiumerkrede je la 17a horo. La grupo ellaboris planon por sia agado ĝis la fino de la jaro. Estas planitaj ekskursoj, vizito de recitadoj kaj teatra spektaklo „Levski“, pri diskutoj de filmoj ktp. La gelnantoj ekde nun komencis labori por la estonta partopreno en la junulara festivalo. Oni plezure akceptos leterojn de similaj grupoj por interŝanĝo de sperto en la laboro. Adreso: p. k. 66, Sofia, por la Grupo „Ĉiam antaŭen“.

URBO STANKE DIMITROV. „Marek“ estas la nomo de nia societo kaj ĝi estas pseŭdonimo de la granda komunisto kaj revoluciulo, la famekonata aganto de la bulgara kaj internacia laborista movado Stanke Dimitrov. Nia societo ne ĉesas labori. La estraro regule kunidas kaj la kunvenoj okazas ĉiumerkrede. La societo translokiĝis en la klubejon de la „Bulgara-soveta amikeco“. En la belan ĉambron ni ĉiam povas iri kaj legi la librojn de la biblioteko. Ni sentas nin tre kontentaj, ĉar BKP kaj la Patrolanda Fronto subtenas nian societon ĉiurilate kaj ni ne pagas eĉ centimon por la salono.

Dank' al la korespondado de nia ŝatata sekretariino, la junulino Zdravka, en aŭgusto nian kunvenon vizitis tri fervoraj esperantistoj el Okcidenta Germanujo, el urbo Manheim, la sinjoroj: Johanes Radam, Verner Hosener Ldek kaj la korespondanto Erhard W. Matthes. Oni alportis specialan aparaton kaj projekciis al la ĉeestantoj en la plena klubejo pli ol ducent bildojn de la industria urbo Manheim kaj ankaŭ bildojn pri ilia veturado per la propra aŭtomobilo de Manheim ĝis la belega Rilamonaĥejo. Post la spektaklo s-ro Radam respondis al la multnombraj demandoj. Li substrekis, ke ankaŭ tie, en GFR, oni laboras por la paco kaj malamas la militon, kiu povas denove detrui la homan civilizacion. Li diris, ke Esperanto estas subtenata, ĉar ĝi helpas la amikecon kaj interhoman komprenigon. Li diris ankaŭ, ke estas tre kontenta de sia vizito en Bulgarujo, li ĝuis la belajn vidindaĵojn kaj esprimis la estimon al la bulgaraj esperantistoj kaj al la tuta popolo. Ankaŭ ni restis tre kontentaj kaj nun ni esprimas nian koran dankon al la gastoj.

Ni daŭrigos korespondadi kaj konigi al la alilandanoj la vivon kaj la konstruon de la socialismo en nia Patrolando.

Ekde la 25-a de oktobro ni anoncis novan Esperanto-kurson por komencantoj. La estraroj klopodos kolekti la membrokoton kaj plibonigi la organizan laboron.

Ivan Dobrovski

LA KOMPATINDA DOSTOJEVSKI

La eminenta rusa klasika verkisto Dostojevski estis antaŭ nelonge subigita al neordinara aflikto. En iu liceo de Usono estis farita enketo inter la lernantoj pri la temo „Kiu estas Dostojevski?“ Dudeksep procentoj de la lernantoj respondis:

„Venkinto en ĵeto de diskoj dum la antaŭlastaj olimpikaj sportludoj, gajninto de ora medalo por l' USSR.“

MIĤAJLOVGRAD. En la urbo funkcias la jenaj kursoj: en la ekonomia mezlernejo — I-a kurso kun 38 partoprenantoj, kursgvidanto — Asen Penkov; I-b kurso — 28 partoprenantoj, kursgvidanto — Kiril Miĥajlov; I-g kurso — 42 partoprenantoj, I-e kurso — 40 partoprenantoj, II-a kurso — 44 partoprenantoj, kursgvidanto Asen Penkov; II-b kurso — 41 partoprenantoj, II-g kurso — 45 partoprenantoj, kursgvidantino Marija Makaveeva; II-v kurso — 47 partoprenantoj, III-a kurso — 35 partoprenantoj, IV-a kurso — 40 partoprenantoj, IV-b kurso — 40 partoprenantoj; IV-v kurso — 42 partoprenantoj, kursgvidantino Mariana Popova; III-b kurso — 37 partoprenantoj, kursgvidanto Pârvan Damjanov; kurso por civitanoj — 16 partoprenantoj, kursgvidanto Asen Penkov; en la 1-a elementa lernejo „Kiril kaj Metodij“ — kurso por gelnantoj kun 38 partoprenantoj, kursgvidanto — Pavel Ivanov Pavlov, instruisto en la sama lernejo.

Asen Penkov

VRACA. La 23-an de novembro p. j. okazis junulara E-kunveno, dum kiu k-do Enjo Daskalov parolis pri la vivo de la nederlanda heroino Anne Frank. Li rakontis pri sia persona konatiĝo kun la patro de Anne Frank, ankaŭ pri la heroeca konduto de la juna heroino dum la germana okupado.

Ĉiuj ĉeestantoj aŭskultis atente la interesan rakonton de k-do Enjo Daskalov. Ili unanime decidis la plej grandan E-grupon en Teksa Teknikumo nomi „Anne Frank“ kaj elektis estraron: prezidanto — Enjo Daskalov, instruisto; sekretario — Straĥil Dimitrov, lernanto, kaj membro — Marijka Borisova, lernantino. La novelektita estraro akceptis specialan planon por la laboro de la grupo por klarigado de la vivo de Anne Frank inter la junularaj grupoj en Bulgario.

„Anne Frank — grupo“ esperas ricevi ankaŭ helpon de la estraro de Anne Frank-Domo en Amsterdamo.

Enjo Daskalov

* * *

Li trapasis la pordon de la gloro, tamen antaŭ tio li devis klini sian kapon.

* * *

Post sia reviviĝo Jesuo anoncis sin al la virinoj por pli rapide disvastigi la novaĵon.

VILAĜO KAPITAN ANDREEVO, distrikto de Ĥaskovo. Dum novembro estis fondita Esperanto-grupo „Pionira revo“ de junpioniroj ĉe societo „Juna Vivo“. Ĝi konsistas el 25 anoj. En la estraro estas jenaj junpioniroj: prezidanto — Evdokija Georgieva Paĉeva, sekretario-kasisto — Teoĥar Apostolov Arnaudov, propagandanto — Stojka Angelova Nalambantova.

REMEMORO PRI PETKO MARTINOV

La 24-an de decembro 1963 mortis nia amiko kaj bona esperantisto Petko Dimov Martinov el v. Krân. La morto trafis lin subite kaj perfide. . .

Li estis lignometiisto, membro de la labor-kooperativa agrikultura mastrumo. Esperanto estis plej grava celo en la vivo de tiu ĉi tre laborema kaj scivolema homo. Esperanto-movado en Kazanlâk, Krân, Ŝipka kaj Ĥaĝi Dimitrovo tre multe ŝuldas al li. Li donacis 100 levojn por aĉeto de nia propra klubejo, kaj preskaŭ antaŭ sia morto, kiun li ŝajne antaŭvidis, denove faris donacon de 200 levoj. Li korespondis kun multaj geamikoj en la tuta mondo kaj per Esperanto batalis por la paco kaj por la progreso de nia socialisma lando, ĉar li estis bonega komunisto. La 48-a Universala Esperanto-Kongreso en Sofio por li estis plej granda rekompenco de liaj klopodoj kaj meritoj por nia movado. En Sofio inter la tutmonda esperantistaro li sentiĝis kontentigita, li estis verdstela feliĉulo! . . . Ho ve — nur post kvar monatoj li estis senviva, kaj li vivis nur 72 jarojn.

Ni ne forgesos nian modestan pachtatalanton!

Esperanto-S-to „ROZA VALO“

ING. ĤRISTO TRIKJAKIN

La 27-an de novembro 1964 mortis en Sofio unu el niaj malnovaj esperantistoj ing. Ĥristo Trikjakin. Li fariĝis esperantisto jam en la komenco de la Esperanto-movado en Bulgario. Li estis prezidanto de la Esperanto-societoj en Stara Zagora kaj Kârĝali. Entuziasma esperantisto kaj vigla aginto li ĉiam laboris kaj propagandis por Esperanto.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio!

POR INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Malgraŭ sia 77-jara ekzistado Esperanto estas ankoraŭ en sia adoleska aĝo. Estas necesaj ankoraŭ longa laboro, fortaj streĉoj, multaj jaroj por ĝia maturiĝo. De jaro al jaro ĝi konkeras novajn terenojn, sed multaj ankoraŭ restas neatingitaj. La plej grava el ili estas la scienco! Kaj pro tio batalas la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Ĝiaj fortoj kaj eblecoj estas ankoraŭ tre malgrandaj, tamen almenaŭ ĝi ekzistas, laboras, batalas kaj venkas plurajn obstaklojn, superstiĉojn.

Esperanto ne estas nur hobia, ne estas nur rimedo por amika korespondado kaj babilado, kiel iuj difinas ĝin profane. Ĝi estas grava, serioza socia problemo, epokfara ŝtupo en la kultura evoluo de la homaro. Kaj jen la kapableco de nia lingvo en ĉiuj sferoj de la homa agado kaj kreado levas ĝian prestiĝon, pruvas ĝian ekzistorajton. ISAE per sia agado kaj per siaj presorganoj ludas kaj ludos gravan rolon en tiu ĉi direkto. Estiĝu ĝia membro, substreku ĝiajn celojn, ĝian agadon! ISAE eldonas sian organizon „Bultenon“ kaj sian sciencon organon „Scienca Revuo“. La lasta laŭ sia varia enhavo de popularaj artikoloj el la sferoj de pluraj sciencoj prezentas siaspecan modestan, sed valoran esperantan enciklopedion. Krome ISAE aperigas apartajn sciencajn verkojn.

Por bulgaroj la kotizoj estas jenaj:

- a) membro 1 lv.
- b) abonanto 3 lv.
- c) membroabonanto 3.50 lv.

Turnu vin kaj sendu sumojn al la delegito de ISAE por Bulgario: **Ljubomir Marikin**, str. Dimo h. Dimov 53, Sofia 6.



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Veliko Penev (en simfonia orkestro), ul. Car Asen 46, Burgas, pri muziko kaj literaturo.

Koljo Petkov Kânčev, str. Kn. Emeretinski 78, Loveč — kun gesamideanoj el la tuta mondo je diversaj temoj, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kolorajn bildkartojn, neuzitajn ilustritajn poŝtkovertojn, alumetetikadojn, etikedojn de razilklingoj. Certa respondo.

Boris Ignatov kaj Lilia Georgieva (medicinaj studentoj), str. Bratin dol 16, bl. 3. vh 3, Sofio 30 — en Esperanto kaj franca lingvoj kun la tuta mondo.

Ivanka Ĥr. Kacarova (22-jara f-ino), str. Klisura 30, Sofio X — kun ĉiuj landoj.

Fervojista Esperanto-Societo „Ponto de la amikeco“, p. k. 1, Ruse.

Je la 26-a de februaro 1965 okazos letervespero en v. Zimnica, distrikto de Jambol. Al ĉiu salutonto-certa respondo.

Petr Nedelčev Marinov, str. P. Beron 28, Razgrad — interŝanĝas BK, PK, PM.

Nedelčo Petrov Marinov, str. P. Beron 28, Razgrad — interŝanĝas BK, PK, PM, insignojn.

ĈEĤOSLOVAKLO

Jan Hornik, Bedrichov, Posumavská 9, p. Jihlava — kun ĉl, Pl, PM.

12-a mezlernejo, Junpionira Organizaĵo, Náchod — kun junpioniroj el Pollando, Bulgario, Rumanio, Hungario.

GERMANIO

H. Dito Goeres, Vierseuer str. 225 I 405, Mönchengladbach — mi dankas al ĉiuj, kiuj skribis al mi por viaj amikaj vortoj kaj petas ardonon, ĉar mi ne havas eblecon respondi al ĉiuj.

NEDERLANDO

Von der Hoeven Sr., Zoutkeetsingel 101, Den Haag 4 B — kun la tuta mondo. Li ankaŭ volonte plenumos interŝanĝpetojn.

C. A. Pruissen, Stadhouderslaan 14, Utrecht — pri ĉt.

POLLANDO

Lucyna Strzebonska, Kraków 14, ul. Dąbrowski 4/1 — kun gejunuloj.

Irena Szlachta, Kraków, Rynek Podgórski 7/5 a — kun gejunuloj.

Anna Gunka, Rabka, ul. Orkana 258 — kun ĉl pri ĉt.

Janina Pelc, Łęczajsk, Moniuszki 36, woj. Rzeszów — kun ĉl. pri ĉt.

Magdalena Fijalkowska (ekonomiistino), str. Mariana Buczka 9, m. 4, Gliwice — pri literaturo, turismo, filmoj, pentrarto k. a.

Jola Reysowska (lernantino, 18-jara), Al. Piasta 1, Żłotów — kun bulgaraj gejunuloj, pri sporto, filmoj, PM, PK.

Jan Nanowski, Pasiecznik 46 (pow. Lwówek Śląski, woj. Woj. Wrocław) — kun bulgaraj gejunuloj pri ĉt.

USSR

E. M. Zakaŝanskis, P. O. Box 180, Riga-Centro, Latva SSR — kun ĉiuj landoj, interŝanĝas BK, Esperantaĵojn, insignojn kaj aliajn.

Estona SSR, Kohtla-Järve, Sidesõlm a/k 13, Mare Kingsepp (20-jara), bibliotekistino, pri literaturaj temoj.

30-jara fraŭlino, studentino de Teatra Instituto en Leningrado, deziras korespondi nur pri pupaj kaj marionetaj teatroj. Sendu revuon kun bildoj al: Vera Vasilevna, str. Nižegorodskaja 122, Podšuvejt, Luga, Leningrada distrikto.

Litovio, Laukuva, Šilales raj., Antanavičius Henrikas (18-jara). Bepalov Vladimir, Soči-35, do vostrebovanija — pri sporto.

A. Sišov, Efremov, Mikro-rajon, Tulskaĵa obl., ul. Stroitelej 41, kv. 83 — pri parapsikologio, muziko kaj lingvaj temoj.

Larisa Petjakseva (16-jara), str. Caplina 67, Barnaul 4 — pri literaturo, arto, sporto.

Dunga Jura (21-jara studento), Dnepropetrovsk-10, do vostrebovanija — kun ĉl. pri ĉt.

Mihkel Vaik (16-jara lernanto), Totnimäe s-ag, Hiiumaaraj, Estonio — en Esperanto, rusa, germana kaj angla lingvoj, interŝ. PM, PK, fotojn, librojn, insignojn kaj alumotetikadojn

VJETNAMIO

Dānciū Conghōa, Daihos Ykhōa, Hanoi, Lóp Yza. Tōa, Trān-Quc. Dinh.

ESPERANTO-RONDO ĉe Uzi-na Klubo ROH ZVIL PLZEN, Evorákova 2, Ĉeĥoslovakio, aranĝos LETERVESPERON la 31. III. 1965. Bonvolu sendi salutkartojn kaj leterojn por la ekspozicio. Komencantoj de nia nova kurso kaj anoj de ESPERANTO-RONDO serĉas gekorespondantojn. Ĉiuj ricevos respondon.



La Esperanto-revuo „Bulgario“ aperos plu en 1965. Ĝi estos same tiel enhavoriĉa, ilustrita kaj bonstile redaktata, 48-paĝa krom la kovriloj, „Bulgario“ enhavos kiel ĝis nun 8 kolorajn paĝojn kaj 8-paĝan aldonon kun materialoj pri la enlanda kaj la internacia Esperanto-movado.

Gekamaradoj, abonu la revuon „Bulgario“ kaj abonigu al ĝi viajn alilandajn korespondamikojn. Abono al „Bulgario“ estas plej bela donaco por viaj fremdlandaj amikoj.

Abonojn por revuo „Bulgario“ sendu al la redakcio: str. Levski N-ro 1, Sofio.

Jara abonprezo: Por Bulgario — 3,60 lv.; por la ceteraj landoj — 6 lv. (3 dolaroj).

Ĝu vi deziras koni Bulgarion — la landon de internacia turismo kaj de ĉarmaj feriaj ripozoj? Koni ĝiajn kulturajn, antikvajn kaj artajn monumentojn? Ĝui distran altnivelan literaturan legaĵon en bonstila Esperanto?

Abonu la luksan grandformatan revuon „**RIPOZOJ**“ kontraŭ la modo la sumo de 1,50 usona dolaro aŭ de 1,35 soveta rublo (por bulgaroj 2,40 lv.), sendante ĝin al iu el la subaj adresoj: **Redakcio de „Ripozoj“, bulv. Tolbuĥin 51, Sofio, Bulgario; Via enlanda Esperanto-Asocio; UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando**, kaj ĉiun duan monaton dum 1965 la 36-paĝaj kajeroj de la multkolora ilustrita kaj moderne prezentita revuo venigos al vi la mildan blovon de la brizoj de Nigra Maro la buntkoloran bildon de la Bulgara Riviero kaj la refreŝigan arbaran aeron, de la pitoreska bulgara montaro.

En minutoj de ripozoj, sur la paĝoj de „Ripozoj“ vi trovos en plej plaĉa formo la informojn, kiujn vi certe bezonas.

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, D. Ĵdrakov, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV

Adreso de la redakcio:

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 3-26-8

EVOLUANTA ENTREPRENEJO „PROMIŠLENA ELEKTRONIKA“ — GABROVO

Telefonoj: 26-60; 29-69
Direktoro: 29-39
Bankkonto: 34/45; 35/45
Bulgara Nacia Banko — Gabrovo

Produkta lampajn generatorojn por indukta kaj dielektra varmigo, ultrasonajn generatorojn kaj teknologia ilaron al ili.

Mezfrekvenca elektrona transformatoro por indukta varmigo modelo PE 5-80. Uzebla por plenumo de diversaj teknologiaj procedoj pere de la uzado de indukta varmigo: supraĵa hardmetodo, vasta varmigo de forĝaj premaj elaboraĵoj, fando de ŝtalo kaj koloraj metaloj, luto kaj kurbigo de tuboj, moligo kaj normaligado de ŝtalaj partoj.

Forto — 80 kvh

Frekvenco — 2400/4800/8000 hc

Instalaĵo por luto de plasto modeloj YZP1-1

Uzebla por ellaboro de produktaĵoj el polivinilklorido per luto.

Elirforto — 1 kvh

Laborfrekvenco — 27,12 mghz

Maksimuma luts praĵo — kun dikeco de la lutmaterialo $2 \times 0.5 - 50 \text{ cm}^2$.

Ultrasona generatoro modelo GUI-1.6 por elektroprovizo de ultrasonaj magnetstriktaj vibriloj muntitaj en industriaj instalaĵoj kun diversa teknologia apliko de la ultrasono; purigo de metaloj kaj metalaj partoj, prilaborado de malmolaj facile rompeblaj materialoj k. a.

Forto — 1.6 kvh

Laborfrekvenco — 18—25 khc

